

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (967) • 2024 •



La bona samariano de Vincent van Gogh.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
① +33 (0) 549468021; ✉ philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
① +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
① +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRDSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
① +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adresen de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

... justeco kaj paco sin kisas	75
Tiuj, kiuj volas heredi eternan vivon	81
Enkonduko al ...	84
Bernard Bolzano	86
Biblia vorto kaj mia penso	90
Krio por paco	91
Estimata redaktoro	92
Mallonge el Aruŝo	94
Informetoj	95
Kanto: Lum' krepuska levas sin	96

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, leginte kelkajn ĉi-numerajn artikolojn kaj vidinte filmojn lastatempe, venis en mian kapon la penso pri la bezono de 'rilatoj'. Ni homoj ne kapablas bone vivi sen iel rilati al aliaj homoj. Ni ja estas 'sociaj bestoj'.

Infana sveda preĝo tekstas jene (libere): 'kie ajn mi en la mondo troviĝas, mia beno estas en la mano de Dio'. Tion mi persone spertis plurfoje, kiam mi diversloke laboris – ĉiam eblis trovi kristanan grupon, kiu kore bonvenigis min. Mi neniam estis sola en la granda mondo. Iom kontraste mi ankaŭ spertis, ke kolegoj, kiuj ne trovis tiajn rilatojn, post iom da tempo reiris al antaŭa 'hejma kaj sekura' loko aŭ tute izoliĝis kaj mense malbone fartis.

Mia preĝo estas ke mi, simile al tiuj, kiuj kun varma koro akceptis min, mi povos *disvastigi ĉien vian parfumon, ho Jesuo, ĉien ajn mi iras* (laŭ preĝo de Patrino Tereza).

Bonan legadon mi deziras al vi.

... justeco kaj paco sin kisas
Enkonduka prelego dum kristana kongreso
Vác, Hungario, 3. aŭgusto 2024
Philippe COUSSON, FR

Bono kaj vero renkontiĝas, justeco kaj paco sin kisas.

Psalmo 85:10

Kvankam tiu ĉi temo aspektas tute aktuala, kiam oni rigardas al la aferoj de la nuna mondo, ĝi ne estas tute nova. Antaŭ jardekoj oni jam multe verkis pri ĝi.

Mi trovis libron de franca pastoro aperinta kelkan tempon antaŭ la 2a mondmilito. Ĝi tre paralelas al tiuj, kiuj estis eldonitaj antaŭnelonge. Oni simple devas modifi kelkajn proprajn nomojn kaj loknomojn.

En la jaro 1989 okazis en Bazelo grava ekumena renkontiĝo pri “Justeco, Paco kaj Konservado de la kreo”. La finan dokumenton tradukis al Esperanto Adolf Burkhardt kaj eldonis Bernhard Eichkorn en 1990 kaj reeldonis en 1995. Kelkaj ekzempleroj estas ankoraŭ haveblaj. Tiu “koncilieca proceso” okazis ankaŭ samjare en Seulo.

En la jaro 1990, mi aperigis numeron de la efemera teologia revuo “Evangeliaj Kajeroj” pri Paco, Justeco kun pli ol dek kontribuajoj. Kelkaj ekzempleroj estas same haveblaj.

Eĉ kelkajn jarojn antaŭe aperis broŝuro en 1982, kiu entenas la prelegojn



Repaciĝo. La preĝejo Notre Dame la Grande, Poitiers.

de la 5a ekumena kongreso de IKUE kaj KELI, en Dalfsen, Nederlando, 1981. Ĝia titolo estas: “En la lumo de la Biblio: Kristanoj fronte al nuntempaj problemoj, paco, ekumenismo, rolo de virinoj”. En ĝi estas du tekstoj pri paco.

Kompreneble en multaj landoj kaj lingvoj aperis libroj pri la sama temaro.

Apuda ligita temo estas la ligo inter kulturo kaj kristana fido, Ĉefaj estas la verko de Paul Tillich “Teologio de la

kulturo” kaj tiu de Helmut Richard Niebuhr “Kristo kaj kulturo”.

Mi rigardos tiun ĉi triptikon; *paco, justeco, kulturo* de pluraj flankoj por kompreni kie la kristanoj estas atendataj en siaj praktikoj kaj komprenoj.

Mi komenciĝos per du rakontetoj. La unuan rakonton citas Sinjoro Ma Young Tae en Evangeliaj Kajeroj.

Iu viro perdis sian glavon, kiu falis el ŝipo en la maron. Li tuj markas sur la ŝipon la lokon kie li perdis ĝin.

Sed vi tuj komprenas ke tio estas tre stulta, ĉar la ŝipo foriras kaj la akvo moviĝas. Same tiel oni serĉas la pacon en la malĝusta loko.

Mi fine rakontas duan lian fabelon. La alia rakonto venas el Ĉinio.

Iu infano ludas ĉe puto. Li sukcesis grimpi super la randon, kaj tiam riskas fali en la profundon de la puto. Iu preterpasanto tuj rimarkas la danĝeron, tuj kuras al la puto, kaptas la infanon kaj remetas lin en sekureco apud la puto.

Nenia ligo estis inter ili antaŭ tiu epizodo. La homo faris al si neniujn demandojn pri kiu, kio, kial. Li simple vidis la danĝeron kaj urĝe helpis.

Tiu rakonto diras multon pri niaj rilatoj unu al la alia. Kiam oni tro pri-pensas, oni tiam distingas inter **ni** kaj la **alia**. En la urĝeco, ambaŭ apartenis al la sama “ni”. La problemo venas kiam la alia ne plu apartenas al “ni” – en nia menso, en nia penso, en nia sento.

Tiajn aferojn oni lernas per vortoj, per propagando. En sia libro “LTI, la lingvo de la Tria Regno”, Viktor Klemperer



Philippe Cousson prelegas. Fotis B O Åradsson

montras kiamaniere la nazioj uzis la germanan lingvon modifante la signifon de la vortoj kaj konstruante el ĝi bonegan propagandan rimedon. Intenca modifo de la signifo de la vortoj kaj ĉiamaj mensogoj estigis tiun komunikilon, propagandilon, mensogilon. Neniu lingvo estas garantiata kontraŭ tia mis-uzo. Sufiĉas aŭskulti la nunan rusan propagandon.

Tiu lingvaĵo ĉiam celas la aliajn, ĉiuj tiuj aliaj kulpas pro ĉio, kio misfunkcias. Kaj oni insistas provokante timon, ke precize tiuj aliaj estas minacoj, danĝeroj.

Kiam oni montras al alia grupo, tiam la vero estas en danĝero, la paco estas en danĝero, la justeco estas en danĝero.

Ni do revenu al la signifo de la vortoj, unue en PIV, poste en la bibliaj lingvoj kaj en la teologio kaj la filozofio.

En PIV 2020:

Paco ricevas tri signifojn.

1 Stato de regno, nacio aŭ alia hom-

grupo, kiu ne estas militanta kontraŭ alia

- 2 Stato de anaro (nacio, gento, familio, societo ks), inter kies anoj ekzistas nenia malakordo aŭ malkonsento
- 3 Stato de psiko, kiu ne estas mal-trankviligata de zorgoj, timoj ks.

Por resumi, neniŭ milito, neniŭ malkonsento, neniŭ maltrankvilo.

Justa ricevas ankaŭ 3 signifojn.

- 1 Respektanta egale k senpartie la rajtojn de la aliaj homoj, kaj haviganta al ĉiu lian apartenaĵon
- 2 Konforma al la interna juĝo de la konscienco
- 3 Bazita sur la realo
kaj ankaŭ kvaran:
- 4 Virta.

Sekve, **justeco** ricevas 3 signifojn:

- 1 Eco de tio, kio estas justa
- 2 Sento de la konscienco, per kiu oni redonas al ĉiu lian rajtaĵon
- 3 Plenumado de tio, kio estas justa
kaj ankaŭ aldoniĝas kvara:
- 4 Justico

Resume: egaleco, respekto, konscienco.

En bibliaj lingvoj:

En la Biblia Vortaro de IABO, 1975-1984, ne troviĝas *paco*, nur *justeco*. En MT (Malnova Testamento) justeco signifas skrupulan obeon al la diaj ordonoj. [...] Justeco estas saĝo enkondukita en la vivon.

En la franclingva Biblia vortaro de Bernard Gillièron la klarigoj estas donitaj laŭ la originalaj vortoj hebreaj kaj grekaj.

Paco: hebree *šalom*: kio estas plena, kompleta, trankvila, feliĉa, en

ekvilibro, en kunligo.

greke: *eirênê*: ĉeso de konfliktoj, bonfarto, ordo, bonaj rilatoj.

Por resumi: trankvila kompleto kaj kvieta ordo

Justa, justeco: hebree *cedek*: kio estas konforma, ekzakta, fidela, senkulp.

Greke: *dikaionê*, konforma al la volo de Dio.

Por resumi: fidele konforma al la regulo dia.

En du franclingvaj filozofiaj vortaroj mi trovis la jenon:

Paco: pozitiva konkordo inter homoj per akordo de koroj kaj spiritoj, kiu bezonas kaj internan foroston de perfortemo kaj senton aparteni al la sama kolektivo.

Justeco: respekto de la rajtoj de la aliaj kaj de la leĝo, ekvilibra egaleco de ĉiuj sen distingo inter la homoj.

Tiuj nocioj revenos en la daŭro de mia diraĵo.

Justeco kaj paco sin kisas. Sen surprizo, la katolikaj tekstoj de 1972/1973 de la Papa Komisiono Justeco kaj Paco konfirmas tion, citante la Papon en 1972 dum la Monda Tago por la paco: “Se vi volas la pacon, agadu por la justeco”. La justecon postulas la kristana fido. Por batali la maljustecon, necesas defendi la rajtojn, rifuzi la diskriminacion, antaŭenpuŝi la dialogon. La celo estas liberigo kaj tio postulas modifon de la sociaj strukturoj. Sed tio ne sufiĉos, tio ne estas la celo, ne estas la lasta solvo. La batalo

por la paco ne devas signifi la daŭrigon de la malordo. En tiu batalo por paco kaj justeco gravas la senperforta agado. Fakte, kerne, paco kaj justeco estas la fruktoj de la amo alportata de Kristo. Ni kristanoj devas transiri de individuisma kristanismo sen konsidero pri la alia al liberiga kristanismo.

Ni devas memori la sloganon de la Savarmeo: “Supo, sapo, savo”. Oni ne povas prediki la evangelion de la savo al homo al kiu mankas preskaŭ ĉio. Unue nutri, poste sanigi kaj nur poste prediki.

En tiu sama fluo, ekster la eklezia medio, la traktato de Versailles en 1919 deklaris: “La universala paco povas fondiĝi nur surbaze de la socia justeco”. Tio signifas solidarecon, sekve interdependecon.

*“Supo, sapo, savo”.
Oni ne povas prediki
la evangelion de la
savo al homo al kiu
mankas preskaŭ ĉio.*

La franclingva Grand Dictionnaire de Théologie (granda teologia vortaro) diras la samon. Justeco laŭ la hebrea etimologio implicas senpartiecan egalecon kaj laŭ la greka etimologio juran kaj moralan rektecon. La artikolo levas la problemon de apliko de tiu nocio en kadro de kulturoj kiuj konservas kaj konservigas la socian strukturon de senegaleco. Batali por la socia justeco apartenas al la respondeco de la Eklezio.

Tamen estas danĝero, kiam potencoj pli-malpli ligitaj al la Eklezio volas estri

la socion, kiam ili pretendas defendi la religian ordon. Ĉiam en tiuj situacioj, la perdantoj estas la Eklezio kaj la socio. Tamen estas kristanoj kiuj daŭre defendas tiajn kompromisojn pensante ke ili tiel povas regi la socion. Tion oni nomas *dominionismo*, kaj tio estas trompo, tio estas politika kaj religia fraŭdo.

Alia trompo estas ligita al kio estas “ni”. Defendo de si mem, de aparteno al grupo, nacio, klaso ne povas funkcii kontraŭ alia persono, alia grupo, alia nacio, alia klaso. Tio estas eraro. Tio ne estas justeco. Ni nun vivas en internacia ekonomio. Ĉio havas konsekvencojn ĉie. Justeco internacia postulas respekton de la internaciaj reguloj kaj traktatoj. Eksploatado, kiu daŭrus, malpermesus la pacon. Tiuj maljustaj kaj malpacaj agadoj estas defendataj tra mensogoj, malveroj, karikaturoj, falsaj novaĵoj.

Por lukti kontraŭ tio, por defendi justecon kaj pacon, estas pluraj ĉefaj bataliloj. La senperforta agado ligita kun sentinela viglo povas multon. Plej grava estas edukado, edukado al paco kaj justeco, al respekto al ĉiuj. Tio estas respondeco de la tuta socio. Edukado konstruas la socion de estonteco. Ĝi estu edukado al paco kaj justeco.

Ligi la socian bazon al spaco, al teritorio estas grava eraro. Dio ne estas adorata en unu specifa loko, sed en spirito kaj vero. Dio agas en la tempo, tra la tempo, ne en limigita teritorio, kun limigita nacio. Ne forgesu ke Abrahamo estis vokita por forlasi sian urbon, sian landon. Kaj poste Dio diris al li ke lia beno iros ankaŭ al ĉiuj nacioj kaj popoloj. Ĉiuj homoj same valoras. Tio estas minimuma

postulo por paco kaj justeco. La profetoj de monoteismo profetis por justeco. La profetoj ne profetis por la grandeco de iu nacio, sed por la grandeco de Dio.

La nunaj Eklezioj en Okcidento mal-facile kaj iom post iom komprenis ke iliaj rilatoj kun la kulturo devis ŝanĝiĝi, ke la eklezioj devas lasi, perdi la potencon, por povi defii la socion, la kulturon, kaj denunci la malpacon kaj la maljustecon. La epoko de la kristanaro, [fr: chrétienté, an: christendom) de la kristana regado, ankaŭ nomata cezaropapismo aŭ konstantinismo, finiĝis kvankam kelkaj daŭre deziras ĝin. Dekstruloj en Usono kredigas al la kristanoj, ke ili instalos kristanecon socian vivon. La rusa registaro kredigas, ke ĝi defendas la kristanan etikon kaj moron. Sed tio neniam, nenie estis vero. Ĉiam kiam kristanaj respondeculoj pensis ke ili regas la socion, ĉiam ili estis utiligitaj de la tiamaj kaj tieaj potencoj. Ni nun devas konsciiĝi ke ni vivas en postkristana socio, kaj tio devus eviti kompromisojn kaj permesi al la Eklezio libere denunci la malpacon kaj maljustecon.

Dum la nazia periodo en Germanio, la plejmulto de la protestantaj eklezioj fariĝis la “germanaj kristanoj” aliĝante al la politika sistemo. Reagante kontraŭ, fondiĝis la Konfesanta Eklezio. En 1934, tiu starigis deklaron en Barmen. El tiu deklaro mi citas du pecojn:

5. “*Timu Dion, donu honoron al la Reĝo!*” (1 Petro 2:17)

La Skribo diras al ni, ke laŭ la ordo volita de Dio, la Ŝtato havas, en mondo ankoraŭ ne liberigita kaj en kiu starigas la Eklezio, la taskon

gardi leĝon kaj pacon per uzado de minaco kaj perforto en la limoj de homa klarvido kaj eblecoj. Kun dankemo kaj en la timo de Dio, la Eklezio rekonas la profitojn de ĉi tiu ordo. Anoncante la Regnon de Dio, lian leĝon kaj lian justecon, ĝi memorigas kaj tiujn, kiuj estas regataj kaj tiujn, kiuj regas, pri kio estas ilia respondeco. Ĝi fidas kaj obeas la potencon de la Vorto de Dio, ĉar estas per ĝi ke Dio subtenas ĉion.

Ni malakceptas la malveran doktrinon, laŭ kiu la Ŝtato devus kaj povus, preter la kompetenteco de sia aparta misio, pretendi fariĝi la unika kaj tuta ordo de la tuta homa vivo kaj tiel plenumi la alvokiĝon mem de la Eklezio.

Ni malakceptas la malveran doktrinon, laŭ kiu la Eklezio devus kaj povus, preterpasante la kompetenteco de sia aparta misio, alproprigi la karakteron, la taskojn kaj la prestiĝon de la Ŝtato kaj tiel fariĝi sin organo de la Ŝtato.

6. “*Jen mi estas kun vi ĉiam, ĝis la fino de la mondo*” (Mateo 28:20); “*La Vorto de Dio ne estas ligita.*” (2 Timoteo 2,9)

La misio de la Eklezio, en kiu enradikiĝas ĝia libereco, konsistas en komuniko al la tuta popolo, en la loko de Kristo, do en la servo de lia Vorto kaj lia laboro, atestitaj per predikado kaj la sakramentoj, la mesaĝon de la libera graco de Dio.

Ni malakceptas la malveran dok-

trinon, laŭ kiu la Eklezio povus, pro ago de homa aŭtonomeco, meti la Vorton kaj laboron de la Sinjoro en la servon de ĉiaj deziroj, celoj kaj planoj elektitaj de sia propra aŭtoritato. [...]

Post la dua Mondmilito, en 1945 en Stuttgart, la tuta germana protestanta eklezio verkis deklaron. Mi citas:

Per ni, senfina maljusto estis venigita super multajn popolojn kaj landojn. Tion, kion ni ofte atestis en niaj komunumoj, ni esprimas nun en la nomo de la tuta Eklezio: Ni ja batalis dum longaj jaroj en la nomo de Jesuo Kristo kontraŭ la pensmaniero, kiu trovis sian teruran esprimon en la naci-socialisma reĝimo de perforto; sed ni akuzas nin, ke ni ne staris al niaj kredoj pli kuraĝe, ke ni ne preĝis pli fidele, ke ni ne kredis pli ĝoje kaj ne amis pli arde.

Tiel estas bone esprimita la neebla kompromiso kun la potencoj eĉ la ŝajne “bonaj”. La Eklezio estu tiu efika sentinelo kiu atentis pri la justeco kaj la paco, pri la vero kaj la bono.

En niaj socioj, la problemoj venas kiam oni ne plu sentas kunsuferon, empaton.

Ni ne estu kiel tiuj gapantoj kiuj rigardas al akcidento, al katastrofo, kiuj konsideras la viktimojn kiel malproksimaj. “Tio okazis al iu alia ne konata.” La viktimoj ne apartenas al “ni”.

Aŭ, inverse, kiam oni erarige tro kunsuferas, deklaras ke la viktimoj estas el “ni”, kaj sekve la kulpulo ne povas aparteni al “ni”. Kaj la homamaso prenos la unue suspektitan fremdulon kaj tuj linĉus tion.

Por fini, mi unue volas lasi al vi tiun ĉi frazon, pri kiu mi forgesis la fonton:

***Ne atendu por justeco,
praktiku ĝin.***

Jen la promesita alia rakonto, plus kroma.

Al infano patro donis puzlon de la mondmapo. Li pensis ke la infano bezonos longan tempon por kunigi la pecojn en ĝustan pozicion. Sed, ne atendite, li rapide finis la kunmetadon. La patro miris. La infano klarigis: “sur la dorsa flanko estas portreto de homo. Kaj tion mi facile povis kunmeti.”

Por solvi la puzlon de justeco kaj paco en la mondo, oni devas rigardi al la homo, ne al la landoj.

Adolf Burkhardt notis ion pri la rakonto de Noa kaj la diluvo. Noa lasis la kolombon, kiu revenis ne trovinte lokon por ripozi. Plurfoje li lasis ĝin. Finfine ĝi ne revenis. Ni, viglantaj sentineloj, ne laciĝu en la batalo por justeco kaj paco, por bono kaj vero, fidele kaj pacience.

Mi dankas.

Tiuj, kiuj volas heredi eternan vivon ...

Prediko dum Universala kongreso en Aruŝo
La 4an de aŭgusto 2024 en Katedralo de Sankta Tereza

Pastorino D-ro Miora RAVELOHARISON, MG

La graco kaj paco de Dio la Patro kaj Jesuo Kristo estu kun vi!

Ĉiuj kristanoj preĝas por havi la eternan vivon. Ĉu vere?. Unu leĝisto venis paroli kun Jesuo por tenti Lin. “Kion mi faru, por heredi eternan vivon?” Ĉu li vere volas heredi la eternan vivon? Ĉu li ricevis bona respondon el Jesuo?

Ĉiu, kiu havas celon kaj volas atingi ĝin, devas sekvi malsamajn paŝojn por apliki. Tiuj, kiuj volas heredi la Eternan vivon devas sekvi kelkajn jenajn paŝojn.

Tiuj, kiuj volas heredi eternan vivon
1. Stariĝi kaj veni al Jesuo

Stariĝi signifas preteco kaj venado al Jesuo, estas signo de la decido forlasi la nunan pozicion kaj ŝanĝi ĝin per akcepto de Jesuo. Tio estas, alproksimiĝi al Jesuo.

Ni ne havas eternan vivon ekster Jesuo. Se vi nur legas la Bibliion, nur scias ĝin, nur preĝas, vi ankoraŭ ne havas eternan vivon. Tiuj, kiuj decidas veni al Jesuo kaj akcepti Lin, havos ĉi tiun eternan vivon.

Ekzemple, se oni vidus travideblan monujon, kaj vidas oron en ĝi. Se oni volus havi tiun oron, oni ne nur rigardas ĝin, kaj ne povas havi ĝin fore. Oni provas fari ion por havi tiun oron. Oni estas preta kaj decidas iri al la loko de tiu monujo. Alveninte, oni prenas la monujon, kaj tenas la oron. Tiam oni povas diri: “mi havas la oron”.

Tiel en Kristo, jen kio estas skribita en Johano 3:16 “ĉar Dio tiel amis la mondon, Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas al Li, ne pereu, sed havu eternan vivon”.

Pripensu kaj stariĝu! venu al Jesuo

Genezo 18: 1-8: Kaj aperis al li la Eternulo en la arbareto Mamre, kiam li sidis ĉe la pordo de la tendo dum la varmego de la tago. 2 Kiam li levis siajn okulojn, li vidis, ke jen tri viroj staras antaŭ li. Ekvidinte, li kuris al ili renkonte de la pordo de la tendo kaj kliniĝis antaŭ ili ĝis la tero. 3 Kaj li diris: Mia sinjoro! se mi trovis plaĉon en viaj okuloj, ne pasu preter vian sklavon. 4 Oni alportos iom da akvo, kaj vi lavu viajn piedojn kaj ripozu sub la arbo. 5 Kaj mi alportos pecon da pano, por ke vi fortigu viajn korojn; poste vi foriros; ĉar por tio vi pasis preter via sklavoj. Kaj ili diris: Faru tiel, kiel vi diris. 6 Kaj Abraham rapidis en la tendon al Sara, kaj diris: Rapide prenu tri mezurojn da plej bona faruno, knedu, kaj faru kukojn. 7 Kaj ankaŭ al la bovoj Abraham kuris, kaj li prenis bovidon delikatan kaj bonan kaj donis al la junulo, kaj tiu rapide pretigis ĝin. 8 Kaj li prenis buteron kaj lakton kaj la pretigitan bovidon kaj metis antaŭ ilin, kaj li staris apud ili sub la arbo, kaj ili manĝis.

kaj prenu Lin por vi, donu al Li vian vivon por ke vi havu eternan vivon.

La homoj, kiuj volas heredi eternan vivon, ne nur stariĝas kaj venas al Jesuo, sed

2. Ankaŭ vere amas Dion

(versiklo 27a)

“Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso”

Ami Dion estas engaĝiĝi kun Li, ke ni apartenas al Li. Do ni faros tion, kio plaĉas al Li, Lia volo. Ami Lin estas centprocenta submetiĝo al Li. Ne nur parto de vi, sed kiel tuto, la tuta vi engaĝiĝis por Li. Ami Dion signifas obei Lin kaj vivi laŭ Lia Vorto, laŭ Lia volo. Ni havas profundan rilaton kun Li. Ami Dion signifas meti Lin al unua loko en nia vivo.

Ekzemple: Lola amas sian edzon. Li

ĉiam plibonigas ilian rilaton. Li faras tion, kion ŝi volas. Li ne faras tion, kio malĝojigas ŝin aŭ kio kolerigas ŝin. Ami Dion signifas fari tion, kio plaĉas al Dio kaj honori Lin dum nia tuta vivo.

Ni amu vere Dion ĉiam. Ne nur amu Lin kiam ni bezonas Lin, sed ni amu vere Dion ĉiam, se ni volus havi eternan vivon. Dio amas vin, negrave kiu vi estas, kia ajn vi estas, Dio amas vin. Li donis Sian Filon Jesuon por savi nin. Ĉu ankaŭ vi vere amas Lin?

La homoj, kiuj volas heredi eternan vivon, ne nur stariĝas, venas al Jesuo kaj amas Dion, sed

3. Ankaŭ amas siajn amikojn

(versikloj 27b kaj 37)

“Amu vian proksimulon kiel vin mem”

En la parabolo: ĉi tiuj tri homoj havas ion komunan: la pastro, la Levido kaj la

Luko 10: 25-37: 25 Kaj jen unu leĝisto stariĝis, kaj tentis lin, dirante: Majstro, kion mi faru, por heredi eternan vivon? 26 Kaj li diris al li: Kio estas skribita en la leĝo? kiel vi legas? 27 Kaj li responde diris: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem. 28 Kaj li diris al li: Vi prave respondis; tion faru, kaj vi vivos. 29 Sed li, dezirante pravigi sin, diris al Jesuo: Kaj kiu estas mia proksimulo? 30 Jesuo respondis kaj diris: Unu homo malsupreniris de Jerusalemo al Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis kaj batis, kaj foriris, lasante lin duone serviva. 31 Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la saman vojon; kaj lin vidinte, li preterpasis aliflanke. 32 Kaj tiel same unu Levido, veninte al la loko kaj lin vidinte, preterpasis aliflanke. 33 Sed unu Samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj lin ekvidinte, li kortuŝiĝis, 34 kaj alproksimiĝis, kaj bandaĝis liajn vundojn, kaj surverŝis oleon kaj vinon; kaj li metis lin sur sian beston, kaj kondukis lin al gastejo, kaj zorgis pri li. 35 Kaj la morgaŭan tagon li elprenis du denarojn kaj donis ilin al la gastejestro, kaj diris: Zorgu pri li, kaj kion pli vi elspezos, mi tion repagos al vi, kiam mi revenos. 36 Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, sin montris proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj? 37 Kaj li diris: Tiu, kiu faris al li kompaton. Kaj Jesuo diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman.

Samariano ĉiuj vidis la viron vunditan de la rabisto. La pastro kaj la Levido ambaŭ preterpasis la vunditon sen prizorgi lin en danĝero. Ili ambaŭ daŭrigis siajn vojojn.

Nur la Samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie la homo estis, kaj lin ekvidinte, li kortuŝiĝis. La Samariano prizorgis la vunditon. Tiuj, kiuj havas amon, rigardas la aliajn. Ĉiuj vidas, rigardas sed iuj preterpasas kaj iuj helpas. Kaj vi, vidante la aliajn, ĉu vi ĉesas promeni por savi la aliajn? Anstataŭ tio, ke homoj nur rigardas kaj preterpasas, ĉu vi kompatas aliajn? Ĉu vi amas ilin?

La Sanktaj Skriboj diras, “kiu estas vera amiko, amas en ĉiu tempo, kaj fariĝas frato en mizero”. Ni devas rigardi aliajn, kiuj bezonas helpojn kaj savojn: tiujn, kiuj estas malsanaj aŭ malsataj, kiuj estas senesperaj, la malliberulojn ktp. Ĉi tiuj estas niaj amikoj. La vera amiko ne povas stari senage antaŭ la mizero de aliaj.

Karaj amikoj, akiri eternan vivon dependas de ni. Ĝi estas preta por ni per



Pastro Gabriel Anda kaj mi (Miora)

Jesuo Kristo. Li atendas, ke ni venos al Li. Amu Dion kaj amu ankaŭ la aliajn ĉar ni ĉiuj estas filoj de Dio.

**Al Dio estu la gloro.
Amen**

Partoprenantoj de la ekumena diservo



Tiu ĉi enkonduko estis verkita por akompani tradukon de LA APOSTOLAJ PATROJ, kolekto da tekstoj el 1^a & 2^a jc. De tiuj la unua estas LA DIDAKĤE aŭ INSTRUO DE LA 12 APOSTOLOJ. Poste sekvas la LETERO DE KLEMENTO al la eklezio de Korinto, teksto kiun oni konsideras “pruvo” ke la estro de l’ eklezio de Romo estis dekomence estro de la tuta okcidenta eklezio. Baldaŭ ĝi aperos kiel memstara libreto kune kun la t.n. 2^a letero de Klemento, kiu efektive ne letero estas sed vere ege praa prediko kaj la Martirakto pri Klemento.

En foraj tempoj, kelkaj homoj komencis kompili iaspecajn krestomatiojn el tekstoj, kiujn ili opiniis tre gravaj.

Malnova Testamento

En la Hebrea tradicio unue formiĝis la Torao¹, kiun foje oni ankaŭ nomas la Kvinlibro Mosea aŭ Pentateŭĥo. Ekzakte kiam estiĝis ĝia *kanonigo*, neniuj cent-procente scias, sed tradicie oni ligas tion al la agado de Ezra². Modernaj fakuloj ofte diras, ke tempe de Ezra oni kanonigis la Toraon. Antaŭ 200 a.Kr. laŭdire la bloko de la t.n. Profetoj estis kanonigita: tio konsistas el du grupoj da tekstoj, la t.n. Fruaj Profetaj libroj (Josuo, Juĝistoj, Samuel kaj Reĝoj) kaj la Postaj Profetoj (Jesaja, Jeremia, Jeĥezkel kaj la Profeta Dekdulibro). Relative tradicia krome estas la opinio, ke la bloko de la t.n. Skriboj estis kanonigita ĉ 100 p.Kr. (Ijob, Psalmoj, Sentencoj, Predikanto, Alta Kanto, Daniel, Kroniko, Ezra (+ Neĥemja) kaj Ester).

La Hebrea kanono, tiel formita, konsistas el Torao, Profetoj kaj Skriboj (Tora’, Nebiim’ kaj Ĥetubim’ = TeNaĤ). La lasta stadio de la Hebrea kanonigo, miasupoze, estiĝis reage al la ĉiam pli

abunde disvolviĝanta verkada agado de la sekvantoj de Jesuo: estiĝis tiom da leteroj de apostoloj, evangelioj ktp, ke la rabenoj sin sentis kvazaŭ devigitaj konstrui ian “Muron” kontraŭ tiu minacanta inundo. Ĉe tio ili radikale fortranĉis la ne-Hebreajn librojn kaj eĉ la Saĝecon de Jesuo Sirah, kiu origine ja estis verkita Hebre. La limon oni metis ĉe la agado de la lastaj ĝenerale rekonataj profetoj. La 4 libroj Makabeoj kaj Jesuo Sirah per tiu limigo aŭtomate forfalis. En Aleksandrio Egipta formiĝis Helena traduko de la tuta Hebrea Biblia tradicio, inkluzive de la poste ne kanonigitaj. Tiun tradukon ni nomas la Septuaginto (LXX).

Helena kulturo

En la sama Aleksandrio Egipta, ĉe la mondfama biblioteko, oni kolektis literaturaĵojn kaj sciencajn verkojn en la Helena, se eble el la tuta konata mondo.

La Aleksandriaj bibliotekistoj kaj ekzegezistoj kompilis kaj prikomentis la grandajn kanonojn de la Helena literaturo. Dank’ al tiu laboro oni science “purigis” kaj transdonis kopiant la tekstojn de Homero, de la fruaj lirikistoj,

formis kanonojn de po 7 tragedioj de Eshilo, Sofoklo kaj Eŭripido, ktp ktp. Sed kontraste al la Hebrea popolo, la Helenoj – politike, dialekte kaj filozofie tre dividitaj – neniam alprenis iun kanonon, kiu leĝe, etike kaj religie efikus kiel la Hebrea Biblio.

Nova Testamento

Kristanismo transprenis la Septuaginton de la Aleksandria tradicio, kaj formis sian propran kanonon pri tipe Kristanaj tekstoj: la Nova Testamento.

Sed ĉe tiu historio pluraj tekstoj malaperis, kiuj laŭ pluraj movadoj aŭ tendencoj – foje konsiderataj kiel herezaj de la plimulto – tamen havis gravecon. Kelkaj dumtempe restis kvazaŭ rande de kanoniĝo, sed fine tamen ne povis eniri “inter la Muron” de kanoneco. Aliaj el la fruaj tekstoj neniam eĉ pretendis fariĝi kanonaj, sed tamen restis legataj en frukristanaj rondoj.

Ankaŭ ekster la Eŭropa kulturejo

Kompreneble ne nur en la Hebrea kaj Helena lingvejoj jam tre frue oni kompilis grave influajn kolektaĵojn da tekstoj. Same

okazis en la Ĉina kaj en aliaj kulturoj, sed pri tiuj mi ne studis, do ne serioze povas verki. Espereble ankaŭ en ilia kulturejo oni verkos pri tio.

Ekster la Muroj 3

El la amaso da fruakristanaj tekstoj kelkajn de la plej gravaj vi renkontos ĉe la nuna entrepreno. LA APOSTOLAJ PATROJ estas la tradicia indiko, kiun unua uzis J.B. Cotelier en 1672 por sia eldono Latinlingva de Barnabas, Clemens, Hermas, Ignatius kaj Polycarpus. Poste al tiu tekstaro oni aldonis kelkajn kromajn tekstojn el la plej frua kristanismo. Tiun kolektaĵon en la nuna eldono ni prezentas al nia klera publiko.

Jam tre frue post mia Esperantistiĝo mi interesiĝis pri ĉi tiu entrepreno, sed daŭre intervenis aliaj taskoj. Nun do fine atingas sian kompletigon la laboro, kiun siatempe ankoraŭ juna mi komencis per la Didaĥeo, kiu estis mia unua aperinta tradukaĵo en Esperanto (IABO, Ravenna, 1979).

1 Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj kaj Readmono.

2 Vidu en 4 Ezra 14 (en La Duakanonaj Libroj, Vol. 3).

3 Tiun origine intencitan titolon mi menciis en Konciza historio de Kristanismo, p.16.



La bildo temas pri transdono de miaj tradukoj pri NT (Paŭlo, la 4 Evangelioj & Flanke je Jesuo) kaj 3 volumoj Duakanonaj Libroj kaj Ekster la Limo plus Nombroj.

Bernard Bolzano

(1781-10-05 – 1848-12-18)

Prelego por la 73-a Kristana Kongreso de KELI en Vác, 2024

Oldřich Arnošt FISCHER, CZ

“La tempo alvenos, mi tion diras kun absoluta konfido, kiam homoj abomenos la militon, tiun sensencan strebon prezenti argumentojn per glavo, same tiel ĝenerale, kiel jam hodiaŭ ili abomenas duelon!”

Bernard Bolzano naskiĝis la 5an de oktobro 1781 en Strato Platnéřská en Prago. Lia patro Bernard Pompeius Bolzano estis italo, kiu setliĝis en Praga Malnovurbo jam en la jaro 1767. Patrino Cecilia, germanparolanta aŭstrino, estis edukita en monaĥinejo. El iliaj dekdu infanoj transvivis nur du filoj: la pli aĝa Jan kaj Bernard.

Pli juna Bernard estis malsana. Li suferis de fortaj kapdoloroj, kora aritmio kaj tuberkulozo.

Sed li vivis relative longtempe. 67 jarojn, dum regado de kvin imperiestroj.

En la jaro 1781 imperiestro Jozefo la 2a Habsburga neniigis servutecon. Sed fakte diversaj formoj de servuteco ekzistis dum tuta vivo de Bolzano ĝis la jaro 1848, sed vilaĝanoj povis libere translokiĝi, iliaj infanoj povis studi, kaj pro tio komenciĝis la erao, kiun oni nomas nacia renaskiĝo. Ĉefe parolantaj homoj strebis havi la saman kulturon kaj politikajn rajtojn kiel germane parolantaj aŭstroj.

Bernard Bolzano vizitis bazan lernejon, kvinjaran piaristan mezlernejon kaj poste trijaran filozofian kurson, per kiu li preparis sin por sia universitata

studado. Li estis tre laborema kaj talenta lernanto kaj studento. Lia patro volis, ke Bernard fariĝu komercisto, sed Bernard liajn spurojn ne sekvis kaj volis fariĝi sciencisto. Sed pri kiu scienco okupiĝi? Li petis tempon por la decido. Tial liaj gepatroj lin subtenis ankoraŭ unu jaron.

Dum tiu tempo Bernard studis astronomion, fizikon, ĥemion, sed ankaŭ pli altan matematikon ĉe profesoro Gerstner. Dum finaj ekzamenoj Bernard tiel elstaris, ke profesoro Gerstner volis lin komisiiti al anstataŭo de malsana profesoro de matematiko Stanislav Vydra, kiu blind-



Oldřich Arnošt FISCHER antaŭ sia prelego.

iĝis. Tio ne okazis nur pro tio, ke en la jaro 1800 Bernard estis nur deknauĵara.

Sed Bernard estis ne nur talenta, sed ankaŭ respondeca. La matematiko al li plaĉis, sed li volis fari pli multe da laboro por aliuloj. Pro tio li ekstudis teologion. (Lia patrino ĝojis, sed lia patro estis seniluziita.) Sed li volis nek pastrigi nek monaĥiĝi, ĉar li ne kapablis sendube akcepti ekleziajn dogmojn. Pro tio li akceptis katolikan kredaron, ne kiel eklezian dogmon, sed kiel moralan kodekson. Li submetis kristanan kredon al moralo, laŭ liaj propraj vortoj li volis “kredi sen kredo”.

En la aĝo de 24 jaroj (1805) Bernard pastrigis kaj fariĝis instruisto pri matematiko kaj profesoro pri religio.

Tiam regis imperiestro Francisko la 1a Habsburga. Li kaj lia kanceliero Metternich timis la klerismon, kaj pro tio en filozofia fakultato oni kreis devigan trijaran kurson de religio. Studentoj de filozofio, influitaj de klerismo, disciplinon “religio” ne ŝatis. Sed la predikoj de Bolzano en preĝejo de Sankta Savanto ilin ravegis.

Regantoj volis, ke Bolzano strikte instruu laŭ la lernolibro de religio, kiun verkis kortega parohpastro Jakob Frint. Bolzano la lernolibron ne uzis. Li ne estis bona parolanto, sed per laŭta pensado antaŭ publiko vortigis grandajn verojn. Baldaŭ li fariĝis favorata. Sed en Vieno oni eksciis: Bolzano estas herezulo!

Kion Bolzano predikis?

Pri moraleco

Baza leĝo de moraleco estas intereso de komuna bonfarto. Valideco de tiu ĉi la



Bernard Bolzano.
Public Domain, commons.wikimedia.org

plej alta morala leĝo ne dependas de Dio, pro tio ĝi ankaŭ ne dependas de religio. Ankaŭ Dio mem subtenas sin al tiu ĉi leĝo, ĉar ĝia absoluta libereco ĝuste konsistas en perfekta akordo de ĝia volo kun morala leĝo.

Pri libereco

La libereco ne estas nur ebleco elekti tion, kio al vi plaĉus, sed malaperigo je peko kaj malvirto, tio estas libereco de malbono. Ju pli malmulte homo estas sklavo de siaj pasioj kaj pekaj instinktoj, des pli libera li estas.

Pri Biblio

La Sankta Biblio restos instrua kaj edifa, malgraŭ ke eventoj okazis alie, ol oni en la Biblio rakontas. Morala ordono de Jesuo Kristo estas deviga eĉ por tiu, kiu ne kredas lian historian estadon. Kredo signifas, ke ni tion tenas pro tio, ke ĝi estas morale utila, ne pro tio, ke ĝi estas vero. Oficiale oni Biblion estimas kiel fonton de scio, fakte oni devas ĝin uzi kiel edifan libron.

Pri kredo

Dio ne aperas al generacioj kaj nacioj, ĉar tio estas nur ideoj, ne veraj estaĵoj. Vera apero de Dio estas kredo de unuopulo, malgraŭ ĝi povas esti alia ol kredo de aliaj homoj.

Pri preĝo

Ho, lasu al ni nian dolĉan iluzion, ke Dio nin aŭdas! Sed eĉ pravus malamikoj de religio kaj Dio ne respektus petojn de homoj, la preĝo ne ĉesus esti utila. Ja ĝi al petantoj donas konsolon kaj malpezigon.

Pri senmorteco

Eĉ se nia kredo pri senmorteco estus nura humana fantazio, ĝi meritis ke ni ĝin estimu kiel iluzio, ĉar iluzio estas pli valora ol vero. Kruelaj veroj homon subenbatas al tero.

Pri homoj

En bazaj aferoj homoj egalas. Ekde momento, kiam Jesuo proklamis egalecon de homoj, regantoj ne povas trakti kun siaj servutuloj tiel arogante ol antaŭe, ĉar kaŭze de tio ilin endanĝerigus ribelo.

Pri nacionalismo kaj lingvaj kvereloj de ĉeĥoj kaj germanoj

Lingvo estas nur sociala komunikilo, ne enkarniĝo de nacia spirito. Nacionalistoj preferas nacion al homaro, parton al tuto.

Aŭtoro de deviga lernolibro de religio Frint plendis rekte al imperiestro Francisko la 1a. Li volis, ke Bolzano instruu strikte laŭ la lernolibro, kiu ĉie estis aĉetebla. Bolzano tion promesis, por ke havu trankvilecon kaj tempon por sia laboro, sed sian promeson li neniam plenumis.


En la jaroj 1813 – 1816 Bolzano ne kapablis instrui kaŭze de tuberkulozo.

En la jaro 1818, kiam studentoj ek-rivoltis, Bolzano, kiu ĝuste estis dekano, estro de filozofia fakultato, estis endanĝerita. Precipe d-ro Stifft, persona kuracisto de imperiestro, skribis multajn denunciaĵojn kontraŭ Bolzano.

La 24an de decembro 1819 imperiestro Francisko la 1a perdekrete malpermesis al Bolzano instrui.

Bolzano ne defendis sin kaj foriris al siaj amikoj en kamparon. Sed por li batalis nobeloj, praga ĉefepiskopo Chlumčanský, sciencistoj Josef Dobrovský, František Ladislav Čelakovský, eĉ ĉeĥaj nacionalistoj, kiujn li antaŭe kritikis. Ili sentis, ke Bolzano estas elstarulo kaj la regantoj lin ĉikanas.

En la jaro 1820 Bolzano estis maldungita kaj liaj malamikoj al li malpermesis prediki. En tekstoj de liaj predikoj la malamikoj trovis 112 herezaĵojn.



En la jaro 1825 Bolzano proklamis, ke li per siaj pensoj ne volis endanĝerigi la romkatolikan eklezion.

Se antaŭe li gajnadis profesoran salajron 800 florinojn, en pensio li ricevadis 300 florinojn (ne por unu monato, sed por unu jaro).

En sudbohemia vilaĝo Těchobuz li vivis kiel membro de familio ĉe bienmastro kaj posedanto de vitrofarejo Josef Hoffmann kaj lia edzino Anna.

En trankvileco li verkis siajn librojn pri matematiko kaj filozofio.

Ni ne povus konsenti kun ĉio, kion Bolzano predikis kaj verkis. Iam li havis nerealajn kaj naivajn postulojn. En sia libro *PRI LA PLEJ BONA ŜTATO* (1831), kiu estis unusola utopia verkaĵo eldonita en Bohemio, li kvaronon da jarcento antaŭ Karl Marx alvenis al sojlo de utopia komunismo. En lia utopia ŝtato ĉiuj estas (preskaŭ) egalrajtaj, sed fabriko, entreprenoj kaj kampoj apartenas al ĉiuj civitanoj. Homoj ne povas akumuli proprajn, ĉar ĝi apartenas al la ŝtato. Totalisma ŝtato decidas pri ĉio... Bolzano ne povis scii, ke cent jarojn post lia morto (1948) en Ĉeĥoslovakio komunistoj laŭ sovetaĵ instrukcioj kreos la ŝtaton, kiu decidis ne nur pri tio, kiel homoj devas vivi, kion fabriki, sed ankaŭ pri tio, kion homoj devas pensi. Rememorante socialismon ni en tia ŝtato ne volus vivi. Sed ankaŭ tiel grandaj personecoj kiel Bolzano iam povas erari. Ĉu Karl Marx legis la libron ‘Pri la plej bona ŝtato’ de Bolzano?

Bolzano opiniis, ke eraroj ekestas nur de malbona eksplikoj.

Li mem neniam intence deflankiĝis

de religiaj veroj, sed iam ilin pruvis aŭ pravigis per netradiciaj manieroj.

Post morto de Anna Hoffmannová (1842) Bernard Bolzano foriris al sia frato en Pragon.

Tie li forpasis en decembro 1848.

Ekde la jaro 1992 en Ĉeĥa Respubliko funkcias Societo Bernard Bolzano, kiu strebas pri bona kunvivo de ĉeĥoj kaj germanoj.

Rekomendita literaturo

BERKA, K. 1981: Bernard Bolzano. 1a eld., Prago, Horizont, 133 paĝoj.

ČERVINKOVÁ-RIEGROVÁ, M. 2021: Bernard Bolzano. 2a eld., Mladá Vožice, Městský úřad Mladá Vožice, 63 paĝoj.

HORA-HOŘEJŠ, P. 1997: Toulky českou minulostí. 1a eld., Prago, Baronet kaj Via Facti, 230 paĝoj.

KOVÁŘOVÁ, I. 2005: Bernard Bolzano a jeho vliv na české národní obrození. Čestínář, 15 (speciala aldono), 3-58.

ŠVEJDA, J. 1981: Bernard Bolzano (1781 – 1848). Výběrová bibliografie. 1a eld., Prago, Státní knihovna ČSR, 73 paĝoj.

VLASÁKOVÁ, M. 2021: Bernard Bolzano. 1a eld., Prago, Středisko společných činností, 19 paĝoj.

VLČEK, E. 1981: Bernard Bolzano. Podoba, tělesné vlastnosti, zdravotní stav. 1a eld., Prago, Památník národního písemnictví, 28 paĝoj.

El bibliografio

1804: Pripensoj pri kelkaj objektoj de elementa geometrio / Betrachtungen über einige Gegenstände der Elementargeometrie.

1827: Anatazio aŭ Argumentoj por senmorteco de la animo / Anathasia oder Gründe für die Unsterblichkeit der Seele.
 1831: Libreto pri la plej bona ŝtato / Das Büchlein vom besten Staate.
 1837: Scienco pri scienco... / Wissenschaftslehre...
 1851†: Paradoksoj de nefinio / Paradoxen des Unendlichen.
Personaĵoj
 Bolzano, Bernard Pompeius (1781 – 1848)
 Bolzano, Bernard Pompeius (1737 – 1816)
 Bolzano, Maria Cecilia, fraŭlinnome Maurer (1754 – 1821)
 Chlumčanský el Přestavky kaj Chlumčany, Václav Leopold Ignác (1749 – 1830)

Čelakovský, František Ladislav (1799 – 1852)
 Dobrovský, Josef (1753 – 1829)
 Ferdinando la 5a Habsburga la Bonkora (1793 – 1875)
 Francisko la 1a Habsburga (1768 – 1835)
 Francisko Jozefo la 1a (1830 – 1916)
 Frint, Jakob (1766 – 1834)
 Gerstner, Franz Joseph (1756 – 1832)
 Hoffmann, Josef (1776 – 1859)
 Hoffmannová, Anna (1784 – 1842)
 Jozefo la 2a Habsburga (1741 – 1790)
 Marx, Karl Heinrich (1818 – 1883)
 Metternich, Klemens Wenzel Nepomuk Lothar (1773 – 1859)
 Leopoldo la 2a Habsburga (1747 – 1792)
 Stifft, Andreas Joseph von (1760 – 1836)
 Vydra, Stanislav (1741 – 1804).

❧

Karaj, ĉu eblas laŭdi Dion tiam, kiam ĉio iras malbone, kiam ĉio senespere fuŝas? Estas malfacile, ĉu ne? Tamen en Ĥabakuk la profeto skribas, ke "eĉ tiam" ni povas esti ĝojaj pro la Eternulo, kiu daŭre helpas nin eĉ en malbonaj tempoj. Nia forto ja estas la Sinjoro; ĉiuj malbonaĵoj ne povas venki nin.

Jerald Veit

Ĥabakuk 3:17-19

Kiam la figarbo ne floras,
 La vinberbranĉoj ne donos fruktojn,
 La olivarbo rifuzos sian laboron,
 La plugokampoj ne donos manĝaĵon,
 La ŝafoj estos forkaptitaj el la ŝafejo,
 Kaj en la staloj ne troviĝos bovoj:
 Eĉ tiam mi ĝojos pri la Eternulo,
 Mi estos gaja pri la Dio de mia savo.
 La Eternulo, la Sinjoro, estas mia forto;
 Li faras miajn piedojn kiel ĉe cervo,
 Kaj venigas min sur miajn altaĵojn.
 Al Li, la Venkanto, iru miaj kantoj.

Krio por paco

Prezentado dum la Afrika virina kongreso 2024, en Aruŝa.

Charline Buhendwa TUMUSIFU, DR Kongo

Saluton karaj esperantistoj el la tuta mondo Mia nomo estas Charline Buhendwa Tumusifu.

Mi estas ĉi tie por doni al vi mallongan paroladon: mia lando estas unu el la afrikaj nacioj, kiuj vivas en milito, masakroj, malsekureco, pro ĉi tiu milito niaj fratoj, niaj patrinoj estas seksperfortitaj, niaj infanoj fariĝis orfoj kaj virinoj restis vidvinoj, kaj niaj filinoj portas fruajn gravedecojn kaj niaj patrinoj trovas nedeziratajn gravedecojn pro la banditoj, kiuj faras ĉion por malriĉigi la loĝantaron.

Niaj gepatroj estas mortigitaj kiel ŝafoj sen kompatato. Vivo de homo estas vidata kiel tiu de moskito, ni vivas en timo kaj malespero, ni vivas en la malboneco de armitaj viroj

Estas tiom da infanoj surstrate, kiuj ne havas lokon por loĝi, kie manĝi, ili estas analfabetoj pro manko de rimedoj, ilia estonteco en malespero.

La senkulpaj infanoj suferas de subnutrado pro manko de viglado. Pro la intensa doloro sekiĝis niaj larmoj, ni komencis devigi nin vivi kun niaj vundoj, ĉar neniuj parolas pri ni.

Jen kial mi venas al vi, por ke vi helpu min krei por paco, paco, ni volas pacon en DR Kongo.

Mi diras: ĉesigu la militon, ĉesigu la malsekurecon, ni bezonas pacon. Inter ni

estas certaj homoj, kiuj travivis ĉi tiujn terurajn tempojn kaj kiuj vivas kun ĉi tiu doloro en la koro, tial ni krias pri ĉi tiu malbona situacio en nia lando. Ni krias ĉar ni ne volas, ke aliaj homoj suferu la saman sorton, kiun la plimulto el ni suferis.

Mi tre dankas Esperanton, lingvon kiu ekskludas neniun pro lia deveno, pro lia raso. Esperanto estas por ĉiuj. Esperanto vivu eterne.

Dankon por via afabla atento



Charline Buhendwa Tumusifu

Charline Buhendwa TUMUSIFU, DR Kongo

... jen kelkaj respondoj al viaj demandoj. Jes, la ideo verki ĉi tiun paroladon estis mia propra ideo.

Mi havis la ideon skribi ĉi tiun paroladon unue, ĉar en mia familio estas kvar infanaj viktimoj de la milito aŭ tiu masakro en 2016. Tiutempe okazis masakro en la urbo Béni.

Multaj homoj mortis kiel insektoj, la teroristoj senkompate mortigis la loĝantaron, ili mortigis homojn per maĉetoj, tranĉiloj, koksostoj ktp... dum ĉi tiu periodo mi perdis mian onklon, lian edzinon kaj liajn infanojn. Dum ĉi tiu milito ĉiuj prenis sian vojon por iel savi siajn vivojn. ...

Iun tagon mi sekvis la novaĵojn, kaj mi vidis la kadavrojn de mia onklo kaj lia edzino. En sociaj retoj, do kiam la situacio iom trankviliĝis, mi eksciis pri la infanoj, dank' al Dio, ke ili ankoraŭ vivis.

Mi vojaĝis serĉante ilin en Béni. Estis kvazaŭ ni atendus la tagon de la morto, ĉar ĉie ni trovis kadavrojn mortigitajn kiel moskitoj, eĉ malgrandajn infanojn sen kompatato.

Ekde tiu tempo mi loĝas kun miaj nevoj malgraŭ la malfacila vivo. Ni havas neniun elektron.

Foje kiam mi iras al la merkato aŭ kiam mi promenas en la vilaĝo, mi trovas senhejmajn infanojn, kiuj ne havas kie vivi, kie manĝi. Ili iras serĉi manĝaĵon en la rubejo, ili ne havas vestaĵojn.

Iuj fariĝis almozuloj kaj tio dolorigas mian koron, kiam mi vidas infanon, kaj scias la vivon, kiun ili havis kiam iliaj gepatroj vivis, kaj la vivon, kiun ili nuntempe travivas. Kaj mi ne havas la rimedojn helpi ilin! Tio ĉi rompas mian koron kaj kiam oni provas pridemandi kelkajn infanojn, ili diras, ke iliaj gepatroj mortis en la masakro. Ili estas nuntempe orfoj.

En mia familio, krom la perdo de gepatroj, aliaj estis seksperfortitaj. Ĉi tio restis gravurita en niaj koroj por ĉiam, io neforgesebla.

Mi sukcesis skribi ĉi tiun paroladon ĉar troviĝis kialoj kiuj puŝis min fari tion – por deziri pacon, por ke la masakroj ĉesu, ke la militoj ĉesu. Mi prezentis ĉi tiun paroladon ĉe la Virina Kongreso en Tanzanio. Ĉeestis 37 virinoj, el ili estis 33 afrikanoj, du ĉinoj, kiuj estis ankoraŭ komencantoj en Esperanto, unu usonano kiu estas la edzino de la prezidanto de UEA (Cecilya) kaj unu eŭropano nomata Rodica. ...

Mi prezentis teatraĵeton, kiu montris kiel ni knabinoj estas mistraktataj en niaj familioj. Iuj patroj konsideras la knabojn pli ol la knabinojn. Ili diras, ke havante knabinon estas havi nenion. Havi infanon estas havi knabon. Eĉ ne sendas siajn filinojn al lernejo dirante, ke iliaj studoj finiĝas en la kuirejo de siaj edzoj.

Estis mi, kiu proponis, ke ni faru ĉi tiun teatran prezentadon por montri al la

tuta mondo la suferon, kiun ni spertas kaj kiom multe ni bezonas pacon. Ni volas, ke militoj, masakroj kaj malsekuraĵoj estu ĉesigitaj por ĉiam. Ni mortos pro malsato. Se la milito daŭros, kio estos la estonteco de la venonta generacio??

Niaj koroj sangas pro ĉi tiu milito.

Koncerne miajn studojn, mi ĉesis je certa nivelo ekde 2022 sed ĝis nun mi ankoraŭ ne havis laboron kiel flegistino.

Mi administras malgrandajn entreprenojn por helpi mian familion malgraŭ tio, ke ĝi ne donas al mi multe por kontentigi ĉiujn bezonojn de la familio. Estas mi, kiu respondecas por trovi manĝaĵon por miaj gefratoj kaj ankaŭ por miaj nevojn pagante lernejkotizojn.

Mi estas la plej aĝa filino de la familio inter dek infanoj, mi devas fari ĉion por

mia familio.

...

Mi ne partoprenis KELI-Fakkunsidon. Mi ne legis pri ĉi tiu programo en la konferenca libro.

Krome, mi volis verki alian artikolon, kiu parolas pri la vivo de albinoj en nia lando, precipe en Afriko, por montri kiel ili estas traktataj kaj kiajn problemojn ili trovas ĉe la akompanantaro.

Sed mia telefono ne funkcias kiel ĝi devus, ĉar la ekrano havas problemon, parto de ĝi estis difektita do mi ne povas vidi ĝin klare, la klavaroj estas difektitaj.

Mi pardonpetas pro la ortografia eraro farita en ĉi tiu letero.

Bonvolu korekti ĝin por mi ĉar mi ne estas fakulo pri Esperanto kiel vi.

☞

Al la ĉeestantoj de la kristana kunveno dum UK en Aruŝo

Karaj geaŭskultantoj de tiu ekumena kunveno, mi volas saluti vin nome de la estraro de KELI kaj de la partoprenantoj en la kristana kongreso en Vác, Hungario, kun la temo: *Justeco kaj paco sin kisas*, el Psalmo 85.

KELI kavas nun ĉefe kvar agadojn: nia revuo kiu regule aperas de 1908, Dia Regno, nun ĉiun duan monaton ; nia kongreso (nun la 73a) preskaŭ ĉiujara ; ekde la pandemio niaj retaj Diservoj dank'al pastoro Wolfram Rohloff el Germanio kaj la Bibliaj Tagoj, tre ofte ankaŭ en Germanio.

Antaŭe estis ankaŭ eldona agado: la himnaro Adoru Kantante kaj Nia Historio.

Gravas la ekumena agado per eldono de la Diservo- kaj himno-libro Adoru kiel rezulto de multaj ekumenaj kongresoj.

Krome, la eldonado de la Biblio (unua en 1926) komence per la Bibliaj societoj nun dependas de ni. La lasta eldono okazis dank'al la eldonisto Kava-Pech, t.e. Peter Chrdle (Peter Ĥerdle).

Mi esperas ke la UK estis bona al vi, kaj diras al vi: Ĝis baldaŭ en niaj kongresoj, en legado de Dia Regno aŭ en vizito de nia reta paĝaro, keli.chez.com.

Philippe Cousson, prezidanto de KELI

Mallonge el Aruŝo

Raporteto pri fakkunsido kaj ekumena diservo

Pastorino D-ro Miora RAVELOHARISON, MG

1-Dimanĉe, la 4-an de aŭgusto 2024 okazis la Ekumena Diservo ĉe la Katolika Katedralo de Aruŝo. Pastro Gabriel Anda el Kameruno gvidis ĝin kaj mi predikis pri la Luko 10:25-38. (vidu paĝon 82)

Ĝi traktas pri *“Tiuj kiuj volas heredi la eternan vivon: stariĝas kaj venas al Jesuo, amas Dion vere, amas ilian proksimumojn.”*

Marija Beloŝević organizis tiun Ekumenan Diservon.



2-Vendrede, la 09-an de aŭgusto 2024 okazis IKUE/KELI kunveno tagmeze. Marija Beloŝević gvidis ĝin. Mi legis la leteron de la prezidanto de KELI (vidu paĝon 92).

Mi kaj protestanta pastorino el Koreio ĉeestis tie kun multaj katolikaj membroj. Mi foriris antaŭe ĉar mi devis gvidi la trejnseminaron de ILEI ĉe alia salono en la sama horo.

Jen kelkaj fotoj dum la Ekumena Diservo (paĝo 83) kaj la kunveno.

De maldekstre: mi (Miora) kun pastorino el Koreio en la ekumena kunveno. Fotis Miora Raveloharison

Pacon al vi
Miora Raveloharison

Partoprenantoj de nia kunveno. Fotis Miora Raveloharison



Informoj

Aalen/Germanujo, la 14-an de Septembro 2024

Post longa kaj plenumita vivo ni devas adiaŭi de mia amata edzino, de nia bona patrino, bopatrino, avinjo, fratino, onklino kaj bofratino.

Hedwig Schaeffer
(denaska Beck)

* 30.11.1937 — + 07.09.2024



En profunda malĝojo
Karl Heinz Schaeffer
Familianoj, parencoj, geamikoj

Entombigo okazis la 19-an de Septembro
2024 en la Silvo-Tombejo de Aalen.

Hedwig dum kongreso en Bregdaroc, Hungario 2010

Radio de la amo de Dio

Helpu min disvastigi ĉien vian parfumon, ho Jesuo, ĉien ajn mi iras.
Inundu mian animon per via Spirito kaj per via vivo.
Fariĝu mastro de mia esto en tiel kompleta maniero,
ke mia tuta vivo estu disradiado el la via.
Por ke ĉiu animo, kiun mi alpaŝas, povu senti vian ĉeeston en mi.
Por ke rigardante min, ĝi vidu ne min, sed Vin en mi.
Restu en mi.
Tiel mi brilegos el via sama brilego kaj povos esti lumo por la aliaj.

El la libreto PATRINO TEREZA: PREĜOJ KAJ PENSOJ. Red. Marija Belošević

Lum' krepuska levas sin

(originale verkita en Esperanto)

1. Lum' kre - pus - ka le - vas sin
Ĝo - je, Di', mi be - nas Vin
en ĉi fru - ma - te - na hor'.
kun dank - em', el vi - gla kor'.
Dan - kon! Vi - va - das mi!
Jen no - va tag'!
No - va vi - vo - e - ner - gi',
no - va ŝanc' por bo - na ag',
no - va ŝanc' — por bo - na ag'.

2. Floroj apertigas sin
kaj sin turnas al la lum'.
Mi malferm-anime Vin
kontempladas, Dia Sun'.
Vi, Di', prilumu min
sur mia voĵ',
ĝis mi transe vidos Vin
por etern', en glor', kun ĝoj',
por etern', en glor', kun ĝoj'

LUM' KREPUSKA LEVAS SIN • M kaj E (originale
verkita): Albrecht Kronenberger 2024-08-19